

34-a Jarkolekto * Junio 2020 * N-ro 117



PULPÍ (Almerio)
Geologia trezoro de antaŭ miliono da jaroj

Gazeto Andaluza

Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.

Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto**.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto

REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)

DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.

IMPRIME: Litopress SL Córdoba

DIRECTOR: Ángel ARQUILLOS LÓPEZ

REDACTOR: José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ

COLABORADORES: Alejandro BURGOS ESCALANTE

Vicente HERRERA COBO

ENHAVO

Esperanto en Andaluzio	3
<i>Macharaviaya</i> , la andaluza urbo kie estas solene festata la Usona Deklaro de Sendependenco	6
Lingva Angulo: <i>La preposición EL</i>	10
Poezia Angulo	15
Folioj por Praktikado	18
Komikso.....	22
Turismi en <i>Pulpí</i>	26
Paĝoj pri Nia Historio: <i>Manuel López Hernández</i>	30
Flamenko: <i>El Sordera de Jerez</i>	34
Andaluza Kuirarto: <i>Novembra dolĉa farunaĵo</i>	36
Fervojistaj Angulo: <i>La siderodromofobio</i>	38
Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio: <i>La Monaĥejo de la Anĝeloj en Hornachuelos</i>	41
Krucvortenigmo.....	43
Rebuso	44
Solvoj al la pasintnumeraj krucvortenigmo kaj rebuso.....	45
Humuro	46

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.



ESPERANTO EN ANDALUZIO



➤ Ekspozicio pri Esperanto en Luceno (Kordovo).

La pasintan 11an de julio oni inaŭguris en la urbo Luceno (Kordovo) ekspozicion pri la internacia lingvo Esperanto. Oni aranĝis la ekspozicion en la publika biblioteko kaj la inaŭguron ĉeestis la magistratano pri kulturo de la Urbodomo, la direktorino de la biblioteko kaj reprezentantoj de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

La ekspozicio estis ebla dank'al la streboj de José Carlos Pérez Romero, lucena esperantisto, kiu ricevis la apogon de la estraro de la biblioteko. Okaze de la inaŭguro la direktorino montris la materialon en nia lingvo pri kiu jam disponas en tiu kultur-centro. Inter tiuj libroj troviĝas libro-metodo, poemaro de Federico García Lorca kaj ankaŭ Don Kihoto, ekzemplero de ĉi tiu lasta libro estis fiere montrata de la bibliotekistino al la ĵurnalistoj ĉeestantaj.



La ekspozicio konsistas el paneloj havigitaj de Hispana Esperanto-Federacio kaj dum kelkaj monatoj ili informis pri la lingvo Esperanto, literaturo kaj movado. Pri la ekspozicio kaj la inaŭguro abunde informis la kordova ĵurnalaro kaj eĉ la loka lucena televido.



Ĵurnalistoj informas pri la ekspozicio en Luceno


➤ **Kursoj en Sevilto agnoskataj de la Universitato.**

Guillermo Molleda, profesoro en la Universitato de Sevilto, atingis la agnoskon de 6 universitataj kreditoj por tiuj kiuj sukcese finis elementan kurson de Esperanto. La kursoj estas organizataj de la entrepreno Civiciencia SL, kies celo estas la demokratiigo de la scienco kaj la lingvo Esperanto estas uzata kiel labor-lingvo. Ĉi tiu entrepreno organizos du kursojn, unu por komencantoj kaj aliaj por progresantoj kaj entute aliĝis 80 homoj.

Ĉi tiuj kursoj sekvas sisteman modelon. La komencantoj devas lerni per memstara programo aŭ libro kaj poste oni organizas perretaj renkontiĝoj por praktiki. Ĉi tiuj konversacioj ankaŭ estas profitataj por instrui gramatikaĵojn kune kun aferoj rilataj al la Esperanta-kulturo (historio, komunumo, arto, ktp.)

➤ **Andaluzo, nova prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio.**

La pasintan monaton oktobron renkontiĝis la ĝenerala asembleo de Hispana Esperanto-Federacio kaj inter la traktendaj aferoj troviĝis ŝanĝo de la estraro. José Antonio del Barrio, prezidanto dum preskaŭ 10 jaroj de la hispana federacio, decidis lasi la postenon al alia homo kaj tiu elektata estis Ángel Arquillos López, kiu jam agadis en HEF kiel vicprezidanto. Ángel Arquillos estas la nova prezidanto de la Hispana Esperanto-Federacio dum la proksima 4 jaroj.



Estas necese memori, ke Ángel ankaŭ estas la prezidanto de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, li estas emerita funkciulo de la malaga urbodomo kaj ene de Esperantio li estas konata kiel poeto, li estas aŭtoro de kelkaj poemlibroj.

Gratulon al li kun la espero, ke li sukcesos en siaj du estraraj postenoj en la Esperanto-movado.


aeu
Andaluzia Esperanto - Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto

MACHARAVIAYA

La andaluzia vilaĝo kie estas solene festata la Usona Deklaro de Sendependenco

La 4-a de julio estas ĉef-temo de multaj usonaj filmoj, tiel en la tuta mondo oni konas, ke tiu tago estas festata en Usono por memori la adopton de la Deklaro de Sendependenco la 4-an de julio de la jaro 1776. Tiun tagon la Kontinenta Kongreso deklaris, ke 13 brit-amerikaj kolonioj deklaris sin mem kiel nova nacio, nome Unuiĝintaj Ŝtatoj de Nord-Ameriko (Usono) kaj ili jam ne plu estus parto de la brita imperio.

Dum tiu tago okazas en ĉiuj usonaj urboj festoj kun pireteknikaĵoj, paradoj, foiroj, piknikoj, sport-matĉoj, ktp. Tion ni vidas ofte televide.



Bernardo de Gálvez y Madrid
1746 - 1786

Ĉu ĉi tio okazas nur en Usono? Ne, en andaluzia vilaĝo nomita *Macharaviaya* (prononcu: “Maĉaraviaĵa”) en la provinco Malago dum la 4-a de julio ankaŭ okazas festo por memori tiujn usonajn pionirojn kiuj sendependigis sian landon. Ni konu la kialon.

Bernardo de Gálvez y Madrid naskiĝis en *Macharaviaya* en la jaro 1746. Li estis hispana politikisto kaj militisto. Bernardo partoprenis kiel militisto en kombatoj kaj militoj en Portugalio, en la nordo de Afriko kaj en Ameriko kaj post tiu militista kariero la reĝo nomumis lin guvernisto en Luiziano, tiama hispana kolonio en la nordo de Ameriko. Lia ĉefaj celoj estis eviti la kontraŭbandajn importadojn de varoj inter Luiziano kaj la apudaj britaj kolonioj favorigi la respekton al nord-amerikaj indiĝenoj.

Apogita de sia onklo, kiu estis ministro pri amerikaj aferoj, Bernardo de Gálvez ricevis la apogon de la reĝo Karolo la 3-a por sekrete apogi la ribelulojn de tiuj ankoraŭ britaj kolonioj. Tiel, Hispanio pruntedonis monon al la ribeluloj kaj permesis al ties ŝiparo eniri kaj komerci en hispanaj havenoj en Florido.

En la jaro 1778 la kaŝita apogo fariĝis oficiala milit-deklaro kontraŭ Britio, malgraŭ la fakto, ke Bernardo de Gálvez mem agnoskis, ke la hispana armeo ne estis sufiĉe forta en tiu teritorio por lukti kontraŭ britoj. Do, por eviti unuan atakon de la brita armeo li decidis bati unue. Kun apenaŭ 600 homoj li atakis la britan postenon *Manchac*, tuj apud la hispana kolonio Luiziano. En tiu urbo pli ol 500 nord-amerikaj indiĝenoj aliĝis al hispana armeo. La agad-plano de Bernardo de Gálvez estis ataki britajn urbojn en la suda parto de iliaj kolonioj.



Marŝado de la trupoj de Bernardo de Gálvez tra la rivero Misisipio, de la hispana pentristo Augusto Ferrer-Dalmau

Poste la armeo de la guvernisto bombardis la urbon *Baton Rouge* kaj tie la britoj kapitulacis. Post atakoj al aliaj urbo la hispana armeo detruis la defendojn de la britoj en la sudo, krome Gálvez konkeris insulon en la bahama arkipelago kaj tio malfaciligis la alvenon de pliaj soldatoj el Britio. Ĉi ĉio plibonigis la militan situacion de la usonaj ribelantoj.

Honore al hispana militisto la urbo *Galveston* en la Teksasa ŝtato ricevis sian nomon, ankaŭ la golfo de *Galveston*, la grafejo *Galveston* kaj la urbo *Galvez* en Luiziano. En la jaro 2014 la usona Prezidanto Barack Obama subskribis rezolucion de la Usona Kongreso per kiu oni nomumis al Bernardo de Gálvez, honora civitano de Usono.

Kiel dirite, en *Macharaviaya* (Malago), la naskiĝ-loko de Bernardo de Gálvez, li estas memorata kaj pro tio oni festas la 4-an de julio. La festo okazas ĉiam la unua sabato de la monato. La antaŭa tago okazas parado en la urbo kun la partopreno de homoj vestitaj en antikvaj uniformoj. Okaze de la parado estas eble vidi la hispanajn guberniestrojn, aliajn usonajn heroojn kaj al George Washington mem.



La 4-an de julio en *Macharaviaya*

Jam sabate, oni memoras la batalon de Penzakolo en la jaro 1781, kiam Bernardo de Gálvez eniris en la nuntempan urbon *Galveston* nur kun unu ŝipo kaj malgraŭ tio li venkis la britojn. En *Macharaviaya* tiam okazas sur placo ne-kruela milito kun la partopreno de mutaj vilaĝanoj.

Feliĉe paco denove alvenas kaj ĉio finiĝas per granda festo kun la ĉeesto de tiuepokaj soldatoj, nobelaj damoj en 18-jarcentaj vestaĵoj kaj kun la stratoj plenaj je antikvaj usonaj flagoj.

ALIĜU AL *Andaluzia Esperanto-Unuiĝo*

Se Vi deziras kunlabori en la disvastigado de la internacia lingvo en Andaluzio, jen Via asocio.

Por aliĝi al AEU kontaktu kun: cordoba@esperanto.ac
Jara Kotizo: 20 € pagebla ĉe la jena konto:

- BANKIA

ES80 0487 3225 1420 0000 6979

Okaze de la pago de la jara kotizo bv. informi pri la jenaj sciigoj:

- Nomo de la aliĝanto.
- Afero: Kotizo 2021

HAZTE SOCIO DE LA *Asociación Andaluza de Esperanto*

Si deseas colaborar en la difusión de la lengua internacional en Andalucía, aquí tienes tu asociación.

Para hacerse socio contacta con: cordoba@esperanto.ac
Cuota anual: 20 € que se pueden abonar en la cuenta siguiente:

- BANKIA

ES80 0487 3225 1420 0000 6979

Cuando pagues por favor informa de los siguientes datos:

- Nombre del nuevo socio.
- Concepto: Cuota 2021

Lingva Angulo

La preposición EL →



En español cuando indicamos que algo se dirige desde un punto a otro utilizamos las preposiciones *de* o *desde*, con el sentido de indicar el punto donde se inicia ese recorrido. En esperanto, con la misma idea, usamos la preposición *de*. Sin embargo encontramos también la preposición *el*, para indicar que el movimiento no sólo

se produce desde un sitio a otro, sino también que ese recorrido empieza en el interior de un lugar. Veamos algunos ejemplos.

- La policano forpelis la ŝteliston el la domo.
El policía expulsó al ladrón de la casa.
- Li prenris libro el la biblioteko
El cogió un libro de la biblioteca.
- Prenu dolĉaĵon el la skatolo !
¡ Coge un dulce de la caja !
- Mi esprimas mian bedaŭron el la profundo de mia koro.
Expreso mi lamento desde lo (más) profundo de mi corazón.

Como vemos en todos estos ejemplos existe no sólo un movimiento desde un lugar a otro, sino que también ese movimiento es desde dentro hacia fuera. Así que la distinción más clara entre *DE* y *EL*, es que *DE* designa el origen de algo y *EL* indica que se origina en el interior de algo y el movimiento es hacia fuera. Pero el

uso diario de la lengua también ha dado más sentidos a la preposición *EL*, veamos algunos de ellos:

- *EL* también muestra un cambio desde un estado a otro. Como dice Bertilo Wennergren en “Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko” se trataría entonces de un movimiento figurado. Ejemplos:

- El knabo li fariĝis maturulo kaj tiam li ricevis grandajn instruojn.
Desde una edad juvenil él se hizo mayor y entonces recibió grandes enseñanzas.
- Li vekigis el sia dormo kun profunda maltrankvilo.
Él se despertó de su sueño con una profunda inquietud.

En estos ejemplos vemos que hay un trayecto, aunque sea imaginario, desde la edad juvenil a la madura (1er ejemplo); desde el momento de estar durmiendo a estar despierto (2º ejemplo).

- *EL* también indica origen o procedencia y en este sentido pueden utilizarse indistintamente *DE* y *EL*.

- El kie vi venas? = De kie vi venas?
¿De dónde vienes?
- Mi venas el Hispanio = Mi venas de Hispanio.
Yo vengo de España.

En este ejemplo se puede utilizar tanto *DE* como *EL*. Con *EL* estaríamos diciendo que venimos desde el interior de España y ahora estamos fuera, con *DE* indicamos que venimos desde un punto que se encuentra en España y ahora estamos fuera. Se puede utilizar cualquiera de los dos porque lo que se expresa es totalmente idéntico.

- Con *EL* también indicamos el material de que está hecho algo. Ejemplos:

- Kolono el marmoro.
Una columna de mármol.
- Pokalo el arĝento.
Una copa de plata.
- Vino kaj ĉampano estas trinkaĵoj el vinberoj, sed viskio estas el hordeo aŭ el tritiko.
El vino y el champán son bebidas de las uvas, pero el ĝuisqui es de cebada o de trigo.

La idea que expresa *EL* en estos ejemplos es que antes era un material o un producto (*marmoro, arĝento, vinberoj, hordeo, tritiko*) y de él se ha obtenido otra cosa (*kolono, pokalo, vino, ĉampano, viskio*).

- *EL* también se usa para mostrar un grupo del que se quiere entresacar uno o varios miembros o componentes.

- El ĉiuj miaj amikoj mi preferas Johanon.
De (entre) todos mis amigos yo prefiero a Juan.

Es decir, existe un grupo “ĉiuj miaj amikoj” y de ese grupo extraigo *el* ➔ a uno de ellos.

- El la libroj verkitaj de García Lorca mi jam legis “Ciganan Romancaron”.
- *De los libros escritos por García Lorca yo ya he leído “Romancero Gitano”.*
- El ĉiuj solvoj proponitaj mi elektis la plej malbonan.
De (entre) todas las soluciones propuestas elegí la peor.

También puede indicarse con *EL* la pertenencia a un grupo:

- Li estas unu el miaj plej bonaj amikoj.
Él es uno de mis mejores amigos.

- Por último, y aunque no se trate de un uso muy habitual, *EL* puede indicar lo mismo que *PRO* (a causa de)

- Mi ne povis daürigi la laboron el manko de mono.
- Mi ne povis daürigi la laboron pro manko de mono.

Yo no pude continuar el trabajo por falta de dinero.

En este caso lo habitual es usar *PRO*, aunque también podemos encontrar *EL*.

Por último hay un gran número de palabras, generalmente verbos, en los que aparece contenida la preposición *EL*. Todos ellos indican, aunque sea de una manera figurada, un movimiento de dentro a fuera. Veamos algunos:

- *ELIRI* (*salir*) literalmente *salir de dentro*.

En este ejemplo hay que destacar el hecho de que aunque la preposición *EL* ya vaya incluida en el verbo, para el caso de que queramos también indicar el lugar de donde se sale utilizaremos de nuevo la preposición *EL*.

- Kiam mi vidis la unuan flamon mi tuj eliris el mia domo.
Cuando yo vi la primera llama inmediatamente salí de mi casa.

Para el caso de que no tengamos que indicar en la frase el lugar de donde se sale podremos utilizar la preposición más conveniente. Ejemplos:

- Kiam mi vidis mian amikon mi eliris al li.
Cuando yo vi a mi amigo salí (al encuentro de – hacia) él.
- La fianĉino eliris en tre bela blanka robo.
La novia salió con un bello traje blanco.

- *ELPENSI* (*idear, inventar*) pensar algo y que ese algo salga del interior de la mente. No se trataría de inventar un aparato.

- Li elpensis la tutan historion.
Él se inventó toda la historia.
- ELTROVI (*descubrir*), encontrar algo (trovi) y que ese algo salga hacia fuera, es decir que se dé a conocer.
 - Alexander Fleming eltrovis penicilinon en la jaro 1928.
Alexander Fleming descubrió la penicilina en el año 1928.
- ELIGI (*hacer salir*)
 - Kiam la diino blovis el sia buŝo ŝi eligis fortan venton.
Cuando la diosa sopló de su boca hizo salir un fuerte viento.
- ELPRENI (*extraer*) literalmente coger desde dentro.
 - La infano elprenos buleton el la loteria globo.
El niño extraerá una bolita del bombo de la lotería.
- ELĈERPI (*agotar*) pero no en el sentido de agotar físicamente, sino de que algo se acabe.
 - La libro estis granda sukceso, ĝi estas tute elĉerpita.
El libro fue un gran éxito, está totalmente agotado.

Hay otros muchos más verbos en los que aparece contenida la preposición *EL*. Todos ellos dan la idea de un movimiento desde el interior de algo hacia el exterior, así que recuerda siempre este pictograma:

EL →

Poezia Angulo

Romanco pri la nigra tristo

Pikaj bekoj de la kokoj
serĉe al aŭroro fosas,
kiam de obskura monto
venas Soledad Montoya.
Je ĉevalo kaj je ombro
ŝia kupra karn' odoras.
Brun-ambos la du mamoj
ĝemas for kanzonon rondan.
-Kiun, Soledad, vi serĉas
sola kaj en denso nokta?
-Tio nur al mi koncernas.
Kial vi ne min ignoras?
Mi feliĉon mian serĉas,
la personon al mi propran.
-Soledad de mia penso,
se ĉevalo tro galopas,
ĝi al maro fine venas
kaj en ties akvo dronas.
-Ne parolu pri la maro,
ke la nigra tristo fontas
el la teroj oliv-arbaj
sub folioj murmur-sonaj.
-Soledad, kiel vi tristas!
Kia tristo koror-rompa!
Vi en vana buŝ-atendo
sukon de citrono ploras.



Federico García Lorca
1898 - 1936

-De la forno ĝis la lito
mi kuradas kiel fola,
kaj la du har-plektoj dume
svingas sin al planko doma.
Kia tristo! Karno, vestoj
iĝis jam gagato-tonaj.
Ve, miaj ĉemizoj linaj!
Ve, miaj femuroj rozaj!
-Soledad, en alaŭd-akvo
al vi faru lavon korpan,
kaj en paco vian koron
lasu, Soledad Montoya.
Kantas sube la rivero:
franĝo firmamenta, fronda.
Pere de kukurbo-floroj
nova luno jam sin kronas.
Tristo, ve, de la ciganoj!
Tristo pura, ĉiam sola!
Tristo de subtera fluo
kaj de mateniĝo fora.

Federico García Lorca (1928)

En esperanton tradukis Fernando de Diego.





RENOVIĜIS LA TTT-PAĜO DE *Andaluzia Esperanto-Unuiĝo*

Vizitu: www.esperanto.ac

Tie vi trovos informojn pri kiamaniere lerni Esperanton, vi konos kelkajn agadojn de nia asocio, vi scios pri la manieroj kontakti kun la loka grupoj de Andaluzio.

Kompreneble, ni ankaŭ disvastigas la andaluzian kulturon. Sur la branĉo *Andaluzio, jen via celo!* Vi legos pri la ebloj turismi en Andaluzio, ties historio, arto, pejzaĝoj, ktp. Kaj se Vi interesigas pri muziko, sur la sekcio *Pri Flamenko*, vi trovos datum-bazon pri flamenkaj kantistoj kaj gitar-ludistoj.

Do, vizitu ofte: www.esperanto.ac


Folioj por Praktikado

Recuperamos el nombre de la primera revista del Grupo de Esperanto de Málaga, que se editó en los primeros años de la década de los '80, para crear una nueva sección en nuestra revista, que tiene como objetivo presentar un texto fácil para los lectores que están aprendiendo Esperanto y así poderles mostrar con ejemplos algunas construcciones gramaticales que les pueden ser de interés.

Ni reprenas la nomon de la unua revuo de la Grupo de Esperanto de Malago, eldonita dum la unuaj jaroj de la 8-a jardeko, por krei novan sektion en nia revuo. La celo de ĉi tiu nova branĉo estas prezenti facilajn tekstojn al tiuj legantoj kiuj eklernas la internacian lingvon kaj tiel montri al ili ekzemplojn pri gramatikaĵoj kiuj povas esti utilaj.

DUA FLAGO SUR LA LUNO

Ĉinio estas la dua ŝtato en la mondo kiu sukcese starigis sian flagon en la luno. Tio okazas 51 jaroj post la fiksigo de la unua flago en nia satelito fare de Usono. La Nacia Ĉina Spaca Agenco sendis la spaco-Ŝipon *Chang'e 5* kun la celo preni ŝtonojn el la Luno kaj alporti ilin en la Teron.



La starigo de la ĉina flago okazis ĝuste antaŭ la revena vojaĝo. La flago mezuras 2 metrojn longe kaj 90 centimetrojn alte, ĝi pezas proksimume unu kilogramon kaj ĝi estas el speciala materialo por elteni la sunan radiadon. Inter la jaroj 1969 kaj 1972 usonaj astronautoj jam starigis 6 flagojn sur la Luno. Nun, 51 jaroj poste, Ĉinio faris same.

Aprender esto puede ser útil:

- **STARIGI:** recuerda que el sufijo *IG* significa “hacer...” y tiene como función convertir un verbo intransitivo en transitivo. Es decir, un verbo que no necesita de objeto directo (intransitivo), lo convierte en un verbo que sí lo necesita (transitivo).

Veamos esta frase: *Mi staras* (yo estoy de pie). Este verbo es intransitivo, porque “estar de pie” no exige la presencia de un objeto, a diferencia de otros verbos como *legi* (leer), así *mi legas libron* (yo leo un libro). Está claro que si yo leo, tengo que leer algo (ese algo sería el objeto directo), mientras que un verbo como *stari* no exige la presencia de ese objeto.

Sin embargo si a este tipo de verbos intransitivos le añadimos el sufijo *IG* (*starigi*), entonces lo convertimos en transitivo y ya sí necesitan de un objeto.

Stari: estar de pie *Starigi:* hacer estar de pie, plantar.

Y evidentemente si hacemos estar de pie, si plantamos es porque lo hacemos con algo, en este caso “*flago*” (una bandera) y ese algo va en acusativo “*flagon*”. Así:

Ĉinio sukcese starigis sian flagon : China plantó con éxito su bandera.

- **SIA FLAGO:** recuerda el uso del pronombre posesivo *SIA*. *Mia* = mi / *Via* = tu / *Lia-Ŝia-Ĝia* = su (de él-de ella- de ello neutro). Veamos algunos ejemplos sencillos:

Mi legas mian libron / *Vi skribas vian leteron* /

Pero en la tercera persona, tanto del singular como del plural, debemos distinguir si el objeto pertenece al sujeto o no. Veamos la diferencia:

Ĉinio starigis sian flagon : China plantó su bandera

¿De quién era la bandera? Si hemos utilizado *SIA*, entonces se refiere al sujeto, es decir, la bandera era china. Sin embargo, si decimos:

Ĉinio starigis ĝian flagon : China plantó su bandera.

En este caso la bandera no era de la propiedad de quien actúa como sujeto, sino de otra persona.

- **FARE DE**: “por parte de”. También puede utilizarse *far*’.
- **PRENI ŜTONOJN EL LA LUNO**: “coger piedras de la luna”. Recuerda la preposición *EL* que hemos estudiado a fondo en las páginas anteriores. En esta frase se indica que las piedras se extraen de un sitio, en este caso de la luna. Si hubiéramos dicho “*preni ŝtonojn de la Luno*”, en este caso habríamos indicado que las piedras eran propiedad de la luna, pero en ningún modo indicaríamos extracción.
- **EN LA TERON**: “A la tierra”. Seguramente si hubiéramos traducido literalmente del español al esperanto habríamos escrito “*Al la Tero*”. Sin embargo “*al la Tero*” en esperanto significaría “en dirección a la Tierra”, pero no necesariamente el destino final sería la Tierra. Para indicar el destino final de un trayecto, es decir, el objetivo de un viaje utilizaremos *en + acusativo*. Ejemplo:

Mi iras al Sevilon. Yo voy dirección a Sevilla, pero ¿Es ese mi destino final? No, quizá vaya a Cádiz pero para ese destino final debo tomar la dirección a Sevilla. Si queremos indicar el destino final, es decir el lugar al que finalmente nos dirigimos, diríamos: *Mi iras en Sevilon*.

- **ANTAŬ LA REVENO**. “Antes del regreso”. Recuerda que “*antaŭ*” significa por sí mismo “antes de”, no es necesario añadir la preposición “*de*”, basta con “*antaŭ*”. Sin embargo, si después de “*antaŭ*” aparece un verbo en infinitivo entonces diremos “*antaŭ ol*”.

Mi dormis sufiĉe antaŭ ol eklabori : Yo dormí suficiente antes de empezar a trabajar.

- **MEZURI:** “medir”. Es un verbo transitivo, el resultado obtenido tras la medición irá en acusativo. El concepto por el que medimos algo (altura, peso, ancho...) irá en forma de adverbio.

Mi mezuras 1'75 metrojn alte : Yo mido 1'75 metros de alto.

También podría decirse “*laŭalte*”, es decir “según altura”.

- **EL SPECIALA MATERIALO:** “de un material especial”. Recuerda el uso de la preposición *EL* que hemos visto en páginas anteriores. *EL* se utiliza también para indicar de qué están hechas las cosas.

Pokalo el arĝento : Copa de plata.

Flago el speciala materialo : Bandera de un material especial.

- **POR ELTENI:** “para soportar”. La preposición “*por*” significa “para”. No hay que confundir con el “por” español.

Por + infinitivo = para + infinitivo

Si el verbo que aparece en infinitivo es seguido de un objeto directo, naturalmente ese objeto irá en acusativo.

Por elteni altajn temperaturojn = Para soportar altas temperaturas.

- **POSTE:** “después”. A la preposición “*post*” tiene que seguirla un verbo o un sustantivo:

Post labori mi volas ripozi : Después de trabajar quiero descansar.

Mi ferioj post mia laborado : Yo tendré vacaciones después de un largo trabajo.

Sin embargo si “*post*” tiene que ir solo, entonces se convierte en un adverbio “*poste*”:


51 jaroj poste = *post 51 jaroj*



GENIUS



La Ekzameno







Respondo:
 Denove la solvo estas tre simpla. La instrumento estas belega kaj tre praktika. Do, mi serĉus la arkitekton kiu dezajnis la konstruaĵon kaj mi al li proponus jenon: se vi sciligas al mi pri la alteco de la konstruaĵo mi donacos al vi ĉi tiun belegan kaj praktikan ilon. Tiel, mi povus korekti la altecon de la konstruaĵo dank'al tiu ilo.



Turismi en ... PULPÍ (Almerio)

Tuj apud la Murcia regnolando, en la plej orienta regiono de Andaluzio troviĝas *Pulpí*, en la provinco Almerio. En ĉi tiu vilaĝo estas eble trovi montaron, ebenaĵojn kaj belegajn plaĝojn, ankoraŭ ne troe vizitataj de turistoj.

El la historia vidpunkto, oni trovis kelkajn restaĵojn de la neolitika periodo, ankaŭ ceramikaĵoj el la romia civilizacio. Do, verŝajne ne tro malproksime de *Pulpí* ekzistis romia vilaĝo aŭ vilao. Okaze de la araba konkero de la Ibera Duoninsulo *Pulpí* fariĝis grava trapasejo inter la urboj *Vera* kaj *Lorca*. Post la kristina konkero de la murcia *Lorca*, meze de la 13-a jarcento, *Pulpí* estis landlima zono inter la kristana regnolando Murcia kaj la islama Granado, pro tio dum multaj jaroj tie ne troviĝis stabila enloĝantaro.

En la jaro 1488 la kristanaj trupoj konkeris la gravan almerian urbon *Vera*. La regiono kie nun stariĝas *Pulpí* estis ankaŭ konkerita, tamen neniu loĝis tie pro la oftaj atakoj de berberaj piratoj. Tiu problemo solviĝis dank'al la konstruo de defend-turoj kaj fortresoj en la marbordoj kaj al la establigo de trupoj por defendi la zonon de tiuj surpriz-atakoj.



Blazono de
PULPÍ

Meze de la 17-a jarcento la urbodomo de *Vera* disdonis ter-pecojn de *Pulpí* inter terkulturistoj, tio faciligis la establigon de konstanta enloĝantaro en la teritorio. En la jaro 1836 *Pulpí* sendependiĝis el la apuda *Vera*, tamen pro ekonomiaj problemoj tio ne efektiviĝis ĝis la jaro 1862. En tiuj jaroj la enloĝantaro plinombriĝis dank'al la eltrovo de arĝenta vejno en tiu zono kaj al la posta fondiĝo de kelkaj minejoj.

En la 20-a jarcento, dum la dua Hispana Respubliko, la urbestro de *Pulpí* kolektivigis

la teron por atingi pli fruktodonan profiton, ĉi tiu socia eksperimento finiĝis dum la hispana civil-milito. Dum la 6-a jardeko de la pasinta jarcento *Pulpí* enriĉiĝis dank'al la ter-kulturaj resursoj kaj al la ekigo de la turisma industrio. Hodiaŭ la vilaĝo estas alloga kaj vizitinda loko kun pli ol 9.000 enloĝantoj.

Monumentoj

Kastelo de Sankta Johano




Temas pri defend-fortreso starigita ĉe la marbordo por protekti la vilaĝon kontraŭ la berberaj piratoj.

Preĝejo de Sankta Mikaelo

Konstruita komence de la 19-a jarcento laŭ nov-klasika arkitektura stilo.

Geodo de *Pulpí*

Eltrovita en la jaro 1999 fare de mineralogista grupo, temas pri giganta geodo, ĝi eĉ estas la plej granda en Eŭropo. Temas pri kavo en petro, plenigita per kristaloj. Ĝi troviĝas en la interno de fer-plumba minejo je 50 metroj profunde.

Geodo de *Pulpí*

Festoj

Festo de Sankta Mikaelo

Fine de la monato septembro okazas la festo de Sankta Mikaelo. Tiam piratoj, kaperistoj, pirat-galionoj aperas denove ĉe la marbordo de *Pulpí*. Sed atentu, vi devos promenadi kun prizorgo, ĉar fajr-taŭroj persekutos vin. Kompreneble ne temas pri taŭroj blovantaj fajron, sed pri puŝ-ĉaretoj kun pireteknikaĵoj kiuj persekutas ĉiujn surstrate.



“Fajr-taŭro” (reale puŝ-ĉareto) lanĉas pireteknikaĵojn sur-strate

Gastronomio

La gastronomio de *Pulpí* estas miksaĵo de la murciaj kaj andalusiaj kutimoj. Bongustaj estas la frititaj paneroj kaj rizo kun fazeoloj. Sendube la plej bona deserto estas gras-torto kun grivoj.



Frititaj paneroj de *Pulpí*

Venont-numere *TURISMI EN ...*
UBRIQUE (Kadizo)



Paĝoj pri Nia Historio

Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio

Manuel López Hernández
1956 - 2020

Ofte, kiam oni aŭdas pri *denaskuloj* ni pensas pri orienteŭrop-devena esperantista, ĉe kies familio oni parolis malsimilajn lingvojn kaj kies gepatroj ekkonis unu la alian okaze de internacia kongreso. Jes, sendube tiu estis la deveno de la plejmulto da denaskuloj. Tamen, tiu ne estis la origino de Manuel López Hernández.

Lia patro, Manuel López Serna, lernis Esperanton en la jaro 1936, ĝuste en la komenco de nia terura civila milito, kiam li estis apenaŭ 17-jaraĝa knabo en Callosa de Segura (Alakanto).

Kune kun aliaj junuloj, inter kiuj indas menciigi al ĵus-forpasinta Antonio Marco Botella, li fondis en tiu malgranda vilaĝo tre viglan Esperanto-grupon, kiu, bedaŭrinde, devis ĉesi ĉiujn agadojn kiam en la jaro 1939 la milito finiĝis. Malgraŭ tiu malpermeso kaj la fuĝo de kelkaj elstaraj membroj de la grupeto, kiel Antonio Marco mem kaj Francisco Zaragoza Ruiz, Manuel López Serna metis sian domon jen la servo de la movado kaj tie, la esperantistaro renkontiĝis por praktiki la internacian lingvon. Esperanto ne estis movado bone akceptita de la nova frankisma reĝimo, sed Manuel López Serna ne dubis resti fidela al al Zamenhofa idealo.



*Kaj mi foriros. Kaj la birdoj daŭros
kaj ilia kanto.*

*Kaj restos mia korto kun ĝia verda arbo
kaj ĝia puto en blanko.*

Juan Ramón Jiménez

Kiam la movado denove ekfunkciis leĝe en Hispanio, Manuel López Serna fariĝis SAT-representanto en nia lando. Do, li agadis favore kaj propagande al asocio defendanta la liberigon de la proleta klaso ene de ŝtato kie ekzistis nur unu oficiala politika partio faŝims-devena, ne-kredeble! En la monato novembro 1956, Concha Hernández, edzino de Manuel, naskis du ĝemelajn filojn: Lorenzo kaj Manuel.

Ekde la infan-aĝo la patro parolis al ili kaj al la ceteraj filoj en Esperanto. Geedzoj estis hispanoj, do, unuavide, ne estis necese uzi plian lingvon ol la hispana ĉe la familia vivo. Krome, Manuel López Serna ne estis altranga universitata profesoro deziranta havigi al siaj filoj novajn lingvajn rimedojn. Tute ne, ja li estis kanabo-rastilisto kaj tutcerte la riĉeco ne abundis ĉe li. Li eĉ devis elmigri en la urbon Alakanto pro laboraj kialoj. Tamen, malgraŭ ĉi ĉio, Manuel López, fidela esperantisto, deziris instrui la internacian lingvon al sia idaro kaj cele al tio, li uzis la plej efikan metodon, tiu kiu baziĝas sur la konstanta kaj ĉiutaga uzo.



Jun-aĝe Manuel López Hernández studis en la porinstrua lernejo kaj post kelkaj jaroj li eklaboris en Korunjo (Galegio). De tie, meze de la 8-a jardeko, li iris en Sevilon, tie li ankaŭ laboris kiel instruisto. Mi memoras, ke en la andaluzia ĉefurbo li elektis lernejon en unu el la plej malriĉaj kvartaloj de la urbo. Mi demandis al li kial tion li faris, ĉu ne estus pli taŭge elekti lernejon kun pli komforta lernantaro? Lia respondo estis firma, tute ne! Li preferis instrui al infanoj laŭ simpla kaj rekta maniero, sen artefariteco, kaj tio nur eblis ĉe modesta lernejo.

En Sevilolo Manuel López Hernández, *Manolo*, tuj kontaktis kun la tiea esperantistaro. Ĉiu-jaŭde li ĉeestis la Akademion de Esperanto de la strato *Sol*. Kiam tiuj klasoj-renkontiĝoj finiĝis ni ĉiuj vizitis

apudan trinkejon kie abundis ŝercoj, biero kaj la plej alta lingva nivelo de mi iam aŭskultata. Manolo perfekte integriĝis al la urbo Sevilo, ĉiujare li vizitis la mond-faman tiean foiron kaj li eĉ kapablis paroli laŭ la sevila parol-maniero. Fine de la 8-a jardeko Manolo, kune kun aliaj membroj de la Sevila grupo, decidis reorganizi la instruistan E-movadon en Hispanio, tiel li fariĝis reprezentanto de ILEI, la internacia societo de esperantistaj instruistoj, en Hispanio kaj li laboris por aranĝi novan ekzamenan kaj diploman stud-planon por la instruado de Esperanto en Hispanio.



Meze de la 8-a jardeko, la sevila E-junularo aranĝis futbal-teamon kiu partoprenis en urbodoma sport-ligo. Kompreneble Manolo ankaŭ aliĝis.

En la jaro 1989, okaze de la Hispana Kongreso de Esperanto okazanta en Bilbao, nova skipo eniris en la estraron de la hispana federacio. Antonio Alonso Núñez estis la nova prezidanto kaj Manuel López Hernández la sekretario. Sed li preferis nomi la postenon kiel “agantan sekretarion”, ĉar li neniam povis pripensi postenon aŭ okupon en la movado se tie li ne povis efektiviĝi sian laboremon. Li estis la sekretario de Hispana Esperanto-Federacio ĝis la jaro 1993.

En tiu jaro li ekigis novan periodon en sia vivo. Li marŝis el Sevilo en *Moguer*, vilaĝo en la provinco Onubo. Tiel li laboris kiel profesor, poste eĉ direktoro de la Gimnazio “Juan Ramón Jiménez” kaj ankaŭ tie li konis Amalia, ŝi estis

lia kunulino ĝis lia lasta vivo-tago. La patro de Manolo, tiu alakantano kiu, ankoraŭ knabo, lernis la internacian lingvon forpasis en la jaro 2012. Tiam la filo skribis nekrologon kaj li parolis pri sia patro kiel *honesto laboristo kun vivo simpla kiu revis atingi mondon pli justan, fratecan kaj liberan*. Post legi tiujn vortojn mi povas certigi, ke Manuel

López Serna ne nur instruis novan lingvon al sia filo, li ankaŭ montris al li novajn idealojn kaj sekvindan vivo-vojon, ĉar ankaŭ tiuj estis la revoj de Manuel López Hernández.

La pasintan monaton oktobron Manuel López Hernández forpasis. Tamen, sciante, ke iu vivas dum ekzistas memoro pri li, do, Manolo vivos dumlonge. Kaj en tiu memorata vivo li ĉiam parolos Esperanton dum jaŭda vespero en Seviljo, antaŭ freŝa biero kaj ĉe bonhumura kaj esperoplena etoso.

Vi pace ripozu, kara amiko Manolo !

J.M.R.H.



Historia Arĥivo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Apartado de Correos 611
14080 Córdoba ~ cordoba@esperanto.ac

FLAMENKO

El Sordera de Jerez



Manuel Soto Monge
El Sordera de Jerez

Manuel Soto Monge naskiĝis en Jerezo en la jaro 1927, ĝuste ĉe la kvartalo Santjago, kiel la flamenka arto estas nepra kondiĉo de la pejzaĝo mem. Li naskiĝis ĉe cigana familio, ene de dinastio de la flamenka parto. Liaj onkloj estis *Paco la Luz* kaj *Sordo la Luz*, el kiu Manuel Soto prenis la krom-nomon, tiel li estis konata kiel *El Sordera de Jerez*.

La patro de Manuel estis kamparano, tie li aŭskultis la plej puran flamenkan kantadon. Tamen la patro ne deziris por sia filo la flamenkan vivon, tiutempe kanti ne

estis taŭga laboro ĉar tiu arto ne havigis al kantistoj sufiĉajn vivrimedojn kaj pro tio kantistoj nepre devis dediĉi al aliaj okupoj. Tio mem okazis al Manuel Soto kiu, krom ter-kulturisto, li laboris kiel barelisto kaj fiŝ-vendisto, ĉio necesa por vivteni sian edzinon Lela, ili geedziĝis tre junaj.

Post sia reveno el la deviga milit-servo Manuel Soto dediĉis sin plentempe al flamenka kantado. En tiu tempo riĉaj proprietuloj organizis flamenkajn festojn kaj tuj Manuel Soto elstariĝis kiel bonega kantisto. Organizantoj de flamenkaj festivaloj atentis baldaŭ pri tiu juna kantisto kaj tiel li estis dungata por kanti en konataj flamenkaj spektaklejoj de Kadizo kaj Sevilo. Tie, pli-malpli, kantistoj disponis pri sufiĉaj vivrimedoj.

Meze de la 5-a jardeko li decidis iri en Madridon kun sia familio. Tiam la hispana ĉefurbo ankaŭ estis la plej grava centro de la flamenka arto. Li kantis en la flamenka spektaklejo “*El Duende*”. La plej grava flamenka kantisto de tiuj jaroj *Manolo Caracol* invitis lin kanti en sia fama spektaklo “*Los Canasteros*”, tie li estis unu el la ĉefaj kantistoj dum kvin jaroj.

En la jaro 1967 li partoprenis, kune kun aliaj kantistoj, en la surbendigo de la disko “*Canta Jerez*” (Jerez kantas). Post tiu sukceso li komencis turniron kun sia flamenka arto tra la tuta mondo: Londono, Nov-Zelando, Sud-Afriko. En la jaro 1974 li atingis premion de la Katedro pri Flamenkologio kaj li surbendigis kvar pliajn diskojn. Kiam en tiuj jaroj li revenis en Andaluzion li estis la plej fama flamenka kantisto.

Fakuloj asertas, ke Manuel Soto *El Sordera de Jerez* estis pura flamenka kantistoj kiu serĉis instruojn en la plej antikvaj fontoj. Li sekvis la tradiciajn kantojn de la plej aĝuloj kaj li ĉiam estos agnoskata kiel la plej grava reprezentanto de la Flamenko laŭ la jerez stilo. Tre famaj estis liaj fandangoj kaj bulerioj. Manuel Soto forpasis en la jaro 2001 en Jerezo. Lia filo Vicente Soto “*El Sordera*” sekvis sian vojon en la flamenka kantado.

LA PENADOJ DE LA AM’ (tango de Manuel Soto *El Sordera de Jerez*)

*Tiu kiu diras, ke ne estas
doloro en sia kor’
do, koron li ne tenas
tiel ne videblas la dolor’.*

*La penadoj de mia am’
tiuj finon ne havas,
ili estas penadoj por ĉiam.*

*En nia mond’ ĉio mensog’ estas
kaj tiuj kiuj serĉas ion vera
al li nur la frenezo restas.*

*Amon mi al ŝi montris
sed ŝi tuj respondis ne!
Kompromisojn ŝi ne volis.*

ANDALUZIA KUIRARTO

Novembra dolĉa farunaĵo

Dum la monato novembro en Andaluzio niaj prauloj estas memorataj. Estas tempo por repreni antikvajn tradiciojn ankaŭ el la gastronomia vidpunkto. Kiel deserto estas kutimo prepari dolĉajn farunaĵojn, ĉi tiu manĝaĵo rememorigas al ni infanajn momentojn.



Jen la ingredientoj:

- Faruno (100 gramoj)
- Oliv-oleo (malpli ol decilitro).
- Lakto (iom malpli ol unu litro).
- Sukero (200 gramoj).
- Salo (iomete).
- Cinamo. • Anizo.
- Paneroj. • Citron-ŝelo.
- Melaso

Jen la ellaborado:

1. Varmigu lakton super ne tro intensa fajro. Ene de ĝi enmetu citron-ŝelon kaj cinamon. Kiam la lakto ekbolas malpliigu la fajron dum 4 minutoj. Poste estingu ĝin. Demetu la citron-ŝelon kaj la cinamon.
2. Verŝu en paton oliv-oleon kaj poste la panerojn (ne tro larĝe dispecigitaj). Fritu ilin.
3. Kiam la paneroj jam estas frititaj, demetu ilin el la pato. Ene de tiu sama oliv-oleo, dum unu minuto, fritu la anizon. Poste verŝu la oliv-oleon, sen anizo, en kaserolon. La anizo utilis por aromigi la oleon.

4. Enmetu la farunon en tiun kaserolon, kie jam estis verŝita la oliv-oleo. Dum 30 sekundoj miksu la farunon kun la oleo, pli bone se vi uzas kuleron el ligno.
5. Verŝu la lakton kun la faruno plus oleo. Miksu ĉion dum 2 minutoj.
6. Aldonu sukeron, ne uzu brunan sukeron ĉar la farunaĵo devas aspekti blank-kolora. Aldonu iomete da salo. Denove miksu ĉion.
7. Lasu la tutaĵon en fridujo dum almenaŭ du horoj. Antaŭ ol servi ĝin sur la tablo aldonu la frititajn panerojn. Ankaŭ adiciu iomete da pulvorigita cinamo kaj la melaso.

Ĉi-recepta vortaro:



Faruno



Lakto



Oliv-oleo




Sukero




Salo



Cinamo



Anizo



Paneroj



Citron-ŝelo



Melaso

FERVOJISTA ANGULO

La Siderodromofobio

Timo estas natura emocio de homo, kaŭzita de reala minaco troviĝanta ekster ni. Do, nia korpo kaj nia menso atentigas nin pri tiu minaco. Foje, tiu timo estas kaŭzata de aferoj aŭ objektoj kiuj, verdire, ne povas esti konsiderataj kiel danĝeraj. Tiukaze ni ne parolas pri timo sed pri fobio, tio estas, angora neŭrozo karakterizita per timo en situacioj kie la suferanto perceptas certajn mediojn kiel danĝeraj aŭ malkomfortaj.



Ekzistas tiom da fobioj kiel objektoj aŭ situacioj kaj unu el ili estas la *siderodromofobio*. Ĉi tiu longa vorto pritemas la ne-racian timegon al trajnoj, stacidomoj, reloj kaj specife al ĉio kio rilatas al la fervoja mondo. Kelkaj homoj suferantaj tiun timegon eĉ montras panikon post havi enmane trajnbileton.

La vorto devenas el la jenaj greklingvaj:

- Σίδηρος, *síderos*, “fero”.
- Δρόμος, *drómos*, “vojo, kurado”.
- Φόβος, *fóbos*, “timego”.


Kio povas kaŭzi ĉi tiun timegon? Nu, tre konata estas la timo vojaĝi per aviadilo. Tio sendube fontas el la fakto, ke de tempo al tempo, feliĉe ne tre ofte, okazas aviadil-akcidentoj kaj ties rezulto estas centoj da viktimoj. Krome televidoj vaste informas pri tio kiam ili okazas. Sed kial rilate al fervojoj? Eĉ pli malofte okazas trajn-akcidentoj.

Psikologoj asertas, ke tiuj psikaj traŭmatoj ĉefe aperas dum la infan-aĝo kaj ili povas esti kaŭzataj de kelkaj malagrablaj spertoj kie fervojo ĉefrolis, kaj ne necese okaze de akcidento. Konatulo mia timas kiam li vidas trajnon nur pro la simpla afero, ke dum infan-aĝo li vidis televid-filmon en kiu unu el la ĉefroluloj perdis sian kruron katenitan sur relo. Li scias, ke tio estis nur filmo, do ne reala, tamen la impresoj kaŭzita al li devis esti terura. Al ceteraj homoj ĉi tiu timego, kiel kiu ajn alia fobio, povas ŝajni troigo kaj sendube tiuj kiuj suferas ĉi tiun panikon komprenas tion, tamen ili mem ne povas klarigi siajn sentojn, tiel ili evitas travivi spertojn kie trajno aŭ reloj aperas.



Unu el la plej konataj homoj suferantaj siderodromofobion estis Sigmund Freud. La kialo de ĉi tiu timego de la konata aŭstra psikoanalizisto ne estas tute klara, tamen laŭ kelkaj leteroj adresitaj al kolegoj li mem klarigis, ke dum sian infan-aĝo li devis vojaĝi per trajno pro fiasko de familia negoco. Ŝajnas, ke okaze de unu el tiuj vojaĝoj li vidis gasflamojn kiujn li tu asociis al tradicia religia bildo de infero. Do, infero vidita okaze de trajnvojaĝo.


Se temas pri leĝera siderodromofobio, vojaĝi per trajno povas okazigi nur streson, tamen se ĝi estas pli serioza afero, vojaĝi per trajno povas kaŭzi muskolajn dolorojn kaj kap-doloron. La suferanto konstante stariĝas en la vagono kaj iras de unu loko al alia maltrankvile.



Sigmund Freud, kiu
suferis siderodromofobion

Kiamaniere eviti ĉi tiun fobion? Kompreneble ne ekzistas universala metodo por pritrakti ĉi tiun fobion. Kiel okazas rilate al tiuj kiuj timas vojaĝi per aviadiloj, klarigi ke trajnoj estas unu el la plej sekuraj veturiloj ne estas sufiĉe, pro la fakto, ke temas pri neracia timego kiu ne povas esti solvita per raciaj klarigoj. Psikologoj ofte uzas psikan terapion, kiu baziĝas sur la montrado al la paciento de tio kion li timas, ĉefe trajnoj kaj reloj, akompanitaj de mallongaj vojaĝoj kun la paciento.

Okaze de tiuj vojaĝoj la paciento ricevas sufiĉajn informojn kiamaniere la trajno funkcias, pri la rolo de la reloj kiuj certigas komfortan trairadon de vagonaro, ktp. Kaj ĉi ĉio kune kun kontinua rigardado por montri, ke la vojaĝanto ne veturas sola kaj ke nenio malagrabra okazos.



*Hispana Amikaro de
Fervojistoj Esperantistaj*

fervojista@esperanto.ac

Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

La Monaĥejo de la Anĝeloj en *Hornachuelos*

La antikva monaĥejo de Sankta Maria de la Anĝeloj, meze de la montaro en *Hornachuelos* (prononcu: “Ornaĉuélos”) en la provinco Kordovo, estas alloga loko por tiuj kiuj priesploras misterajn okazintaĵojn. Fondita fine de la 15-a jarcento oni diras, ke la loko mem kie oni starigis la monaĥejon jam estis mistera. Tiel, laŭ legendoj, el la apuda rivero *Bembézar* eliris lumaj fairaĵoj supren la monto. Monaĥoj pensis, ke verŝajne la anĝeloj montris lokon por konstrui monaĥejon kaj pro tio la monto ricevis la nomon “Monto de la Anĝeloj”, tie ĉe kruta rokego oni konstruis monaĥejon dediĉitaj al tiuj spiritaj ĉielaj entoj.



La mistera origino de la loko altiris la atenton de verkistoj kiel la Duko de Rivas, kiu en la jaro 1835 verkis la teatraĵon “*Don Álvaro aŭ la forto de la destino*”, kiu disvolvigas kelkajn scenojn en tiu monaĥejo. Tiu teatra verko estis inspiro por la opero de Giuseppe Verdi “*La forto de la destino*”.

Kiel dirite, multaj legendoj aperis en tiu loko tra jarcentoj. La unua ĝuste okaze de la fondiĝo, kiam la supera patro de la religia komunumo lanĉis malbenon sur tiuj kiuj kuraĝis detrui aŭ ŝanĝi la religian celon de la loko. Eble pro tio, ekde ties fondiĝo ĝis la 17-a jarcento la monaĥejo suferis tri gravajn brulegojn. Post ĉiu rekonstruo nova brulego okazis kaj eĉ oni diras, ke multaj monaĥoj decidis faliĝi sur riveron por eviti la fajron.

Alia rakonto asertas, ke brita nobelo frapis la pordon de la monaĥejo akompanita de sia ĵusa edzino. Laŭdire ili fuĝis el ŝia familianoj, kiuj tute ne akceptis tiun edzan kompromison. La nobelo oferis grandan kvanton da mono por atingi rifuĝon en la monaĥejo kaj la religiuloj tion akceptis.



La monaĥejo nuntempe estas ruinaĵo

Post kelke da tempo alvenis familianoj de la edzino, dezirantaj venĝi la ofendon kaŭzitan de la edzo. Oni diras, ke lukto okazis kaj dum ĝi frato el la virino, nevole, mortigis ŝin per tranĉilo. Post tiu okazintaĵo la monaĥoj petis al la brito forlasi la lokon, tamen li rifuzis tion kaj male, li enŝlosiliĝis en sia ĉelo.

Pasis la tempo kaj tiu homo, tute izolita, freneziĝis. Ĝis kiam iun tagon, li eliris, li supreniris ĝis la plej alta pinto de la sonorilo kaj li elsaltis en la monton kriante *“Mi estas la diablo”*.

Kelkaj aliaj misteraj okazintaĵoj estas rakontataj de tiu loko, ili plenumos novajn paĝojn.

Krucvortenigmo

	1	2	3	4	5	6	7
A							
B		■				■	
C							
Ĉ				■			
D							
E		■				■	
F							


HORIZONTALALE

- A. (*plurale*) Membro de religia komunumo.
 B. Vokalo. ■ (*inverse*) Virino. ■ Vokalo.
 C. (*sen la lasta vokalo*) Teorio de la arto trafe paroli antaŭ publiko.
 Ĉ. Havi koran inklinon al iu ■ (*inverse*) Morfemo uzata por montri personon aŭ objekton.
 D. (*adjektive*) Insularo en la atlantika oceano.
 E. Konsonanto. ■ (*sen la lasta vokalo*) Rasgrupo de hundo. ■ Konsonanto.
 F. Elokventa publika parolanto.

VERTIKALE

1. Mirindaĵo atribuita al dia interveno.
2. Vokalo. ■ Morfemo signifanta inklinon al io. ■ Konsonanto.
3. (*Adjektive*) Ke oni devas skribi mallongan resumon por ne forgesi ion.
4. Membro de grupo. ■ (*sen la lasta vokalo*) malgranda nokta simio grandokula.
5. Specialisto pri parto de la medicino pritraktanta la kuracadon de malsanoj per operacioj.
6. Vokalo. ■ En Romio tri. ■ Konsonanto.
7. Veturado por malpeza velboato, tenata kaj konstruita por konkursoj.

Rebuso



- Urbo vizitata de milionoj da homoj.

- Solvo al la pasintnumera Krucvortenigmo.

	1	2	3	4	5	6	7
A	K	A	R	M	I	N	O
B	R	E	E		S	E	N
C	O	R	F	O	L	I	O
Ĉ	N		U	L	A		G
D	I	N	T	I	M	A	N
E	K	I	O		O	R	A
F	A	N	J	O	N	O	J

- Solvo al la pasintnumera Rebuso.

Kiun filmon vi vidis en la televido?

PIRATOJ DE LA KARIBO

Aperas la greka litero PI (II) + Grupo de ratoj + de la + kario sur dento (do, kari') e fine la litero B (bo) = "Pi ratoj de la Kari bo".

Ĉu la revuo plaĉas al Vi? Ĉu Vi ŝanĝus ion?

Ĉu io aldonebla? Ĉu forviŝi ion?

Komentu kaj proponu per jena kontaktilo:

cordoba@esperanto.ac



HUMURO



La numero 118-a de nia revuo (Septembro 2020) aperos meze de la monato januaro 2021.

cordoba@esperanto.ac

GAZETO ANDALUZIA
Apartado de Correos 3142
14080 CÓRDOBA (Andaluzio – Hispanio)

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.

Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López
Vicprezidantino: Fátima Jiménez García
Sekretario: José María Rodríguez Hernández
Kasistino: María Dolores Torres Mateo
Voĉdonantoj: Jordi Lietor López
Juan García del Río
Carlos Spinola
Alejandro Burgos Escalante
Juan Díaz Casado

Adreso: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga

E-Adresoj: angelarquillos@gmail.com
cordoba@esperanto.ac

TTT-paĝo: www.esperanto.ac

www.esperanto-andalucia.info

Blogo: www.andaluciaesperanto.blogspot.com

Aliaj utilaj adresoj de la Esperanto-Movado

* Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)
uea@inter.nl.net

* Hispana Esperanto-Federacio
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)
admin@esperanto-es.net

